# Esperanto en Danio

14-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2007




La Kulturdomo Dortheavej 61

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

IŭN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Ina Schultz (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Torben Svendsen

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40 eed@esperanto.dk

**Presado:**
Kjeld Steffensen, Malmö

**Adresŝanĝoj al:**
Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58 ina.schultz@get2net.dk

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.08.2007**

# Enhavo

## Lande

Jarraporto de DEA pri la agado dum 2006................3
Protokolo de la ĝenerala kunveno de DEA 2007.....16
Peranto de SEL................18
Nekrologo........................19
Gazeteltondaĵoj...............20

## Loke

Kopenhago......................21
Næstved...........................23

## Monde

Renovigita hejmpaĝo......24
Ekvilibro post trijara laboro......................................24
Simbola konkurso...........26
Mallonge..........................26

# Lande

## Jarraporto de DEA pri la agado dum 2006

### La jaro

En 2006 ni ricevis la malĝojan informon ke la Klubo de Vejle/Fredericia decidis malfondi sin, kaj tiu bedaŭrinda decido kunportis malkreskon de la membronombro de DEA. Ankaŭ de ĉi tie ni esprimas nian dankon al la estraro kaj la membroj de la Klubo por la longedaŭra laboro, kaj bonvenigas la membrojn kiuj tamen daŭre subtenos nin per rekta aliĝo kiel individuaj membroj de DEA. Post tiu malĝoja evento, ĝojige estis konstati la naskiĝon de nova Klubo en Roskilde kiu estas ankoraŭ negranda, sed mi certas ke ĝi pligrandiĝos. Alia ĝojiga konstato estas ke en Odense nia membro Liss-Lotte Talbro instruas Esperanton al malgranda grupo ĉe la vesperlernejo de AOF.

Mi povas ankaŭ informi ke DEA estis tre bonŝanca kaj por la unua fojo havas nun malgrandan oficejon en la Kulturdomo de Dortheavej en Kopenhago, kie ankaŭ troviĝas la biblioteko de Poul Thorsen, kiu testamentis monon por konservigi la bibliotekon. Estis tre bezonate okaze de nia centjara jubileo venontjare havi taŭgan lokon kie ni povas esplori la arkivon de DEA. Sed ankaŭ por KEK/DEFA kaj entute por nia movado estas tre feliĉe ke ni nun havas eblecon kunveni kaj havi aranĝojn ankaŭ tie kaj ne nur dependi de unu sola loko. Tio klare vidiĝis lastjare, kiam KEK/DEFA antaŭ unu jaro tute ne sciis kie ili kunvenos aŭtune.

Ni daŭrigis nian laboron en la tri agadkampoj: informado, instruado kaj utiligado, sed precipe en la agadkampo informado, ĉar nia celo estas daŭre esti videblaj pere de partopreno en aranĝoj kiel tiu de la Kulturnokto, kaj Socia Forumo kaj la diversaj foiroj. Mi

dankas la estraranojn kaj ĉiujn membrojn kiuj kontribuis al nia prospero.

Dum la jaro Forpasis 4 membroj: Poul Thorsen, Roma Thorsen, Erik Brendstrup, Verner Jørgensen kaj Anker Pedersen kaj mi proponas mallongan silentmomenton omaĝe al ili.

## Informado

**Esperanto en Danio**
La revuo aperis 4 fojojn. Ni daŭre ricevas subvencion de la registaro pro la plialtiĝo de la sendokostoj. La presado okazas en Svedio, kaj estas ĝojige konstati ke la eldonkostoj malaltiĝis al preskaŭ la duona prezo.

**Informa materialo**
Ni daŭre disdonadas la plurkoloran flugfolion, sed dum la foiroj ni ankaŭ disdonas kviz-folion kaj aliajn materialojn, kiel ekzemple la DVD eldonitan okaze de la UK en Florenco.

**Prelegoj**
Ileana Schrøder prelegis ĉe virina asocio en Kopenhago kaj Betty Chatterjee prelegis ĉe la Rotaria Klubo en Rødovre.

**Gazetoj**
Dum la jaro 2006 la vorto "Esperanto" aperis en proksimume 70 artikoloj en la dana gazetaro. Ne ĉiam temis pri la lingvo - sed ĝuste la fakto ke ekstermovadaj restoracioj, muzikistoj kaj aliaj uzas la nomon, atestas pri ĝia prestiĝo kaj pri la ŝancoj kiujn la organizita Esperanto-movado devas koni. La mencioj en tutlandaj gazetoj estis grandparte ligitaj al recenzoj de filmo (Babel) kaj de libro (Storbyens Stammer).

La plej menciindaj gazetaj aperoj iniciatitaj de esperantistoj mem estas unuflanke la tradici-stila, sed persista informado de la klubo en Næstved en la lokaj komunikiloj, kaj aliflanke la avangarda agado de la artista duo La Loko. La Loko dum 2006 aktivis ne nur en Kopen-

hago, sed ankaŭ en Islando kaj Tajlando, do kvankam estas nur du sendependaj homoj, ili konsistigas internaci-nivelan entreprenon. Loknivela informado okazis krom en Næstved ankaŭ en Roskilde, Vallensbæk, Vojens kaj Ålborg.

**Hejmpaĝo**

Ni daŭre klopodas plibonigi la paĝojn enhave kaj stile, kaj nia sperto estas ke precipe kiam ni cetere estas videblaj en aranĝoj, ni ricevas retmesaĝojn pri plia informado. Okaze de nia partopreno al diversaj aranĝoj ni konstatis ankaŭ la intereson pri nia lingvo pere de la hejmpaĝo kaj la reto.

**Esperanto-nyt**

Ejnar Hjort eldonis kaj dissendis 1200 ekzemplerojn de Esperanto-nyt en 2006. La ricevantoj estas, krom la membroj de DEA, ankaŭ ĵurnalistoj, gazetoj, lernejoj, gimnazioj, universitatoj, politikistoj, kaj multaj aliaj kiuj ricevas ĝin senpage. Tio eblas nur pro la libervole kaj malavare sendita mono al Esperanto-nyt. Dankon pro tio.

Kompreneble la donacintoj ankaŭ ricevas la revuon, kelkfoje plurajn ekzemplerojn. Studantoj ĵus petis sendi ekzemplerojn, ĉar ili laboras pri projekto de lingvaj problemoj. Ejnar Hjort havas malnovajn ekzemplerojn kaj sendos ilin al vi se vi deziras disdoni ilin.

**Partopreno en ekspozicioj**

Dum la jaro DEA partoprenis en jenaj aranĝoj:

- Dum la Kulturnokto en Kopenhago nia estrarano Bent Jensenius aranĝis la ekspozicion, ĉi-foje en "Medborgerhuset" en Ahlefeldts-gade kiu situas centre de la urbo. Ĝi denove allogis multajn personojn kiuj scivoleme trarigardis la materialon.
- La Librofoiro okazis de la 17a ĝis la 19a de novembro en Forum de Kopenhago. Por la dua fojo DEA aktive partoprenis kun tre bela kaj aktiva stando ekspoziciante librojn, revuojn, flugfoliojn, kaj denove malgrandan konkurson. Dum tri tagoj konstante deĵoris niaj esperantistaj membroj. Ili disdonis senpagajn faldfoliojn pri

Esperanto al kelkaj centoj da interesitaj vizitantoj kaj invitis al Esperanto-kurso.

- Por la unua fojo en Kopenhago ni ĉeestis en la foiro "Korpo-Menso-Spirito" (Krop-Sind-Ånd Messen) kiu okazis de la 2. ĝis la 4. de februaro. Ankaŭ tie ni spertis sufiĉe da intereso kaj disdonis flugfoliojn al la ĉeestantoj.
- En Århus ni partoprenis kune kun la Klubo de Århus en la foiro "Korpo-Menso-Spirito" kiu okazis de la 29. de septembro ĝis la 1. de oktobro. La stando tie ne estis tute taŭga loko kiel en la aliaj foiroj, tamen oni rimarkis intereson.
- Fine de la 3.-5. de marto 2007 DEA kune kun la Nordjutlanda Asocio partoprenis en "Krop-Sind-Ånd" en Europahallen en Aalborg, kie ni rimarkis eĉ pli grandan intereson ol lastjare.

## Eksteraj rilatoj

Ni daŭre sekvas la laboron de la dana UN-Unuiĝo. Dum la jarkunveno en novembro 2006 (kiu okazas nur ĉiun duan jaron) nia asocio estis elektita en la reprezentan rondon de la UN-Asocio.

En junio okazis kongreso de Rotarianoj en Kopenhago, kaj la Rotaria Amikaro de Esperanto pere de Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia organizis inform-standon. Bedaŭrinde ni mem ne povis helpi partoprenante en la stando pro la striktaj reguloj, sed ni pruntedonis inform-materialon al ges-roj Grattapaglia.

DEA sendis plendleteron al la Pola Ambasadejo en Kopenhago pro la malapero de la elsendoj de la pola esperanta programo, petante ke ili transdonu la leteron al la Pola Radio kaj al la Ministro de Eksteraj Rilatoj.

## Instruado: Raporto de ILEI sekcio

En januaro 2006 estis fondita ILEI-sekcio sub gvidado de Arne Casper, kiam la prezidanto de ILEI prof. Radojica Petrović estis invitita por gvidi pedagogian trejn-seminarion por danaj instruistoj

kaj instruantoj. La sekcio havas 16 membrojn kiuj okupiĝas aŭ interesiĝas pri instruado. Dum tiu vizito estis organizitaj kursoj por 10 komencantoj kaj 12 daŭrigantoj.

En septembro 2006 la ILEI-sekcio organizis denove en Roskilde kursojn por daŭrigantoj kaj komencantoj, sub la gvidado de prof. Radojica Petrović. En la kurso por daŭrigantoj partoprenis 13 personoj kaj en porkomencanta kurso partoprenis 5 personoj. Tiu evento donis la okazon fondi asocion en Roskilde. Pri aliaj kursoj: okazas pluraj kursoj en KEK, kaj pri tiuj oni povas legi en la jarraporto de KEK.

## Revu-kaj Libroservo

*Raportas Arne Casper*

2006 estis iom malprospera jaro por la vendo de libroj pro la partopreno en la sveda jubilea jarkunveno, kiam ankaŭ la sveda Libroservo ĉeestis , kaj la vendado duoniĝis.La plejparta vendado koncentriĝis al lernolibroj.

La Revuservo havas konstantan abonantaron de precipe spertaj esperantistoj. Mi daŭre instigas novajn esperantistojn aboni kaj multe legi librojn kaj revuojn.

## Ĉefdelegita laboro

*Raportas Arne Casper*

Ĉiuj kampoj de la ĉefdelegita laboro prosperis en 2006:

- ĉirkaŭ 2500 kr. estis transdonitaj al DEA post la finkalkulo, kio estas kresko kompare kun 2005.
- la membronombro de individuaj membroj alproksimiĝis al preskaŭ 100, kio signifas kreskon de ĉirkaŭ 10 %
- la nombro de membroj de la Societo Zamenhof kreskis de 1 al 8 membroj
- la nombro de delegitoj kreskis kun 2 personoj
- la peranta laboro estis tre vigla. Ĉirkaŭ 40 personoj partoprenis la kongreson en Florenco.

## DEJO

*Raportas Rasmus Høyrup Jensen*

Multe okazis en DEJO dum la pasinta jaro. Ni estis bone reprezentitaj en internaciaj kongresoj, kaj 3 membroj partoprenis en IJK. Pluraj membroj uzis Pasportan Servon kaj estis humilaj gastoj en landoj kiel Bosnio-Hercegovino kaj Hungario. Somerfine niaj membroj Regin kaj Dennis interkonsentis helpi DEA kun programo por pretigi danan-Esperantan vortaron. Estas ĝojige konstati ke tiu laboro kiu enhavas 40.000 vortojn estas jam trione preta.

Aŭtune ni kunvenis por pritrakti la proponon partopreni en Roskilde Festivalo de 2007 kiel helpantoj. Ĝojige pluraj membroj estis pozitivaj, kaj ni nun prilaboras por fari malgrandan tendaron kaj inviti alilandajn esperantistojn partopreni senpage la aranĝon. En oktobro nia membro Jonas Dalmose partoprenis internacian seminarion en Ĉeĥio pri ”Esperanto ĉe Interreto”. DEA eminente helpis financi lian partoprenon. En decembro ni kontaktis Jacob Norfalk por havigi helpon de li por instali novan hejmpaĝon ĉar la evoluo de la malnova hejmpaĝo stagnis. Li interkonsentis, kaj oni povas vidi la rezulton ĉe www.dejo.dk.

Inter Kristnasko kaj Novjaro Jonas Dalmose aranĝis karavanon al Internacia Seminario en Germanio, kaj 5 membroj partoprenis ĝin kaj ĝuis unu semajnon en bona etoso kaj multaj bonegaj travivaĵoj. En la nova jaro nia membro Nina T.H. proponis ke ni kunvenu ĉiumonate kun diversaj temoj. Ŝi komencis invitante la unuan fojon, kiam ni ankaŭ gastigis 7 Esperanto-parolantajn studentojn de la universitato de Lund. Rut J. invitis plurfoje al ujutnaj kunvenoj kun gastoj de Jutlando. La tutan jaron niaj membroj havis la okazon partopreni en kompetenta lingva instruado en KEK kaj ni esperas ke tio pludaŭros la venontajn jarojn.

Antaŭ kelkaj tagoj Kim H. donacis al DEJO unu standardon 5x1.5 metrojn granda kun la teksto: ”Esperanto – por multilingveco kaj multdiverseco”, kaj ni dankas al la donanto por la tre videbla kaj espereble efika reklamilo, pri kiu ni promesas ke ĝi ne restos

senutiligita.

La estraro de DEJO dankas ĉiujn membrojn kaj helpantojn kiuj helpis nin diversmaniere dum la jaro. Ni finas per unu frazo de Julio Baghy kiu priskribas kion printempo alportas: ”La sunradioj ŝtelas sin en la korojn, varmigas ilin per printempaj rememoroj dum la prujnovesta aŭtuno”.

## Dana Esperanto Instituto

*Raportas Lars Kromann-Jensen*

En 2006 38 personoj petis informojn pri niaj kursoj kaj el ili 15 personoj komencis studi la kursojn. Kaj el la antaŭaj jaroj daŭre estis 5 personoj je la kursoj. Dum 2006 cetere 8 personoj finis la kursojn aŭ simple ĉesis!

Ni ne scias pri la kaŭzo de la nesufiĉa partopreno; eble estas pro la kursoj en la Interreto. Sed niaj kursanoj estas vere scivolemaj personoj, kaj ni havas multajn diskutojn kaj pri Esperanto kaj pri lingvaj aferoj, kaj tio estas laŭ ni la forto de niaj kursoj, kompare kun la retaj kursoj. Tamen, - ni daŭrigas nian laboron, kaj havas 4 diversnivelajn kursojn kaj eldonas senpagajn kajerojn pri fonetiko, gramatiko (dana kaj Esperanta) kaj malgranda vortolisto.

## Jarraportoj de la kluboj

### Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago

**Membroj kaj estraro:** La membronombro estas 70 + DEJO-membro, kiu dividiĝas jene: 61 aktivaj, 6 familiaj, 1 pasiva kaj 2 honoraj. - La estraro kunvenis 10 fojojn. Ni klopodas labori pli kiel teamo ol kiel tradicia estraro. Ni faris Vizian Planon.

**Kunlaborantoj:** La dan-sveda laborgrupo kunvenis 2 fojojn: en Kopenhago (11/3) kaj en Helsingborg (21/10). Nia organo *Kontaktilo* pere de PONTO aperis 5 fojojn.

Ni kunlaboras kun DEFA pri la ĉiulundaj programoj, kaj ili

dividas ejon kun ni. Printempe oni sciigis nin, ke ni bezonas translokiĝi, kaj dum monatoj ni ne sciis kien. Aperis solvo, kaj ni ekde septembro kunvenas en Kalvebod Brygge 32.

**Informado:** Novaĵletero estis elsendita preskaŭ ĉiumonate. Flugfolioj estis disdonitaj diversloke. Afiŝoj pri la lingvofestivalo estis pendigitaj en diversaj lokoj.

**Internacian Tagon** la kopenhaga komunumo aranĝis ĉe la lagoj. Ni havis budon inter la aliaj etnaj grupoj. Ni disdonis flugfoliojn. Kim distris el la publika scenejo.

**Lingvofestivalo:** Por la unua fojo en Danio estis aranĝita lingvofestivalo. Ni sukcesis kolekti reprezentantojn de ĉ. 20 diversaj naciaj lingvoj, krom pri brajlo kaj surdula lingvo. Ĉiu el ili havis budon, kaj laŭvice ili sin prezentis en aparta ĉambro. – Kelkaj distris la publikon. La hejmpaĝo www.sprogfestival.dk atendas nin.

**Kultura nokto, publika,** en biblioteko Kim kunlabore kun infankultura domo aranĝis etan ekspozicion, kaj Esperanto De Lŭe ludis interalie novajn verkojn – kaj la

**UEA-belartaj konkursoj** diplomigis Kim J. Henriksen per honora mencio pro 3 muzikvideoj

**Instruado:** Escepte de la somerferio funkciis tie duŝtupaj kursoj, legogrupo kaj studgrupo, kiu legis laŭ Faktoj kaj Fantazioj. Dum ĵaŭdoj ekde septembro krome estis instruado al komencantoj en vesperlernejo. La agantoj: *Zita Garbaravičienė, Regin Larsen, Kim J. Henriksen, Betty Chatterjee, Arne Casper-Mortensen kaj Bent Wiinberg.* La Dana Esperanto-Ekzamena Komisiono estis mendita. 3 personoj plenumis la unuagradan ekzamenon.

**Utiligado:** Dum la jaro okazis 17 prelegoj pere de jenaj prelegantoj: Bent Jensenius, David-Emil Wickström, Ksenia Prilepskaja, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, Egon Starup-Jensen, Birthe Lapenna, Kim Henriksen, Lene Niemann, Lars Kromann Jensen, Ana Røssum, Zofia Fornal.

Aliaj programoj: rakontu pri objekto/vojaĝo kaj legita libro – laŭvice kontribuis ĉiuj. Pri kongresaj travivaĵoj kaj aliaj aranĝoj multaj membroj raportis – numerloterio – Julfesto.

**Somera ekskurso:** Ni kanalŝipis kaj vizitis la agrikulturan alt-lernejon. Ni havis esperantlingvan ĉiĉeronon. Ni finis piknikante en ĝia ĝardeno.

## Esperanto-Unuiĝo de Næstved

*Raportas Grete Nielsen*

Kvankam 2006 ne estis H.C. Andersen-jaro, ni tamen en kelkaj klubkunvenoj fintraktis la fabelon *La semajnotagoj.* Saliko en Finnlando starigis valorajn lingvajn demandojn pri aferoj, kiuj al ni danoj ŝajnis facile kompreneblaj, sed kiuj devas esti klarigitaj al internacia publiko.

Al la publiko ni kiel antaŭe ofertis kelkajn danlingvajn prelegojn, ĉiuj menciitaj en lokaj komunikiloj kaj en Berlingske Tidende-AOK. Temas pri jenaj: Lars Pilegård kaj Søren Willemoes pri la vivo kiel denaskaj blinduloj, Lene kaj Jan Niemann pri fervojaj tuneloj, Arne Juul Ottosen pri Ekvadoro kaj Jette kaj Bjarne Vest pri Vjetnamio – ĉiuj interesaj prelegtemoj, kiuj allogis ankaŭ publikon de la urbo. Antaŭ tiuj aranĝoj ni kune manĝis dank'al Bente, kiu prizorgis la vespermanĝon.

Dum ordinara klubkunveno ni spektis filmon pri *Bona Espero* – pruntebla ĉe DEA, kaj vere rekomendinda ĝi estas. En alia kunveno ni memorigis nian bonan amikon Poul Thorsen, kiu ja mortis en januaro 2006, kaj en iu maniero ankaŭ Poul Stensgaard per televida filmo *Den sidste bonde.*

La somera ekskurso iris unue al Reersø, kiu ja nun multe suferas pro la novembra inundo, poste al Anna kaj Erik en Høng kaj *Kunstnergården* ĉe Dianalund.

Liss-Lotte Talbro de Odense dufoje partoprenis kunvenojn, dum kiuj ni (en la mallumaj vintraj monatoj posttagmeze je 14a horo) pritraktis ĉapitrojn de *Faktoj kaj Fantazioj,* la legolibro de Marjorie

Boulton.

La poŝta reklamilo *Esperanto – et mellemfolkeligt sprog* funkciis en 2006 kaj funkcios ankaŭ en 2007 alterne ĉe la kvar poŝtaj centroj.

*Esperanto-nyt* estis sendita al proksimume 80 adresoj (bibliotekoj kaj medioj). *Dagbladet,* Ringsted aperigis pri ĝi artikolon, kiun oni povas studi en la gazetara kolekto, kiun ni prizorgas por DEA. La *Novaĵletero* de EUN aperis 4-foje – pro diversaj kaŭzoj nun en alia formo ol antaŭe – la estraro kunvenis unu fojon, nombro de aranĝoj estas 17 (1 nuligita pro neĝo kaj 1 pro forvojaĝoj) kaj meza nombro de partoprenantoj 8,1. La klubo havas 20 membrojn.

Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis nian agadon.

## Århus Esperanto-klubo

*Raportas Stanisław Mielczarek*

Esperanto-Klubo de Århus havas nun 28 membrojn. Bedaŭrinde en 2005 mortis Anker Pedersen. Li estis multjara membro de la E-klubo en Odder. Post ĝia nuligo Anker Pedersen fariĝis nia klubano. Li ripozu en paco!

La klubo aktivas interne. Ni koncentriĝis je la laboro por niaj membroj, spertinte ke diversaj eksteraj entreprenoj donis neniun rezulton. Niaj fortoj estas limigitaj, do ni ne povas disigi ilin je diversaj kampoj.

Ni havas tre konvenan, senpagan kunvenejon en Senior-Centret, meze de Århus, pri kio ni – kompreneble – estas tre kontentaj. En la jaro 2005 ni havis 9 klubajn kunvenojn kaj unu someran ekskurson. La temoj de niaj kunvenoj estis diversaj. En januaro ni diskutis pri la cunamo, kiu terure atakis Azion fine de la 2004-a jaro. En februaro okazis nia Ĝenerala kunveno. En aprilo ni honoris la grandan danon – Hans Christian Andersen okaze de la 200-jara datreveno de lia naskiĝo. Ni havis ankaŭ gastprelegantojn, nome du tre aktivajn fervojistojn – Lene kaj Jan Niemann, kiuj rakontis pri la fora Vjetnamio. En majo Stanisław Mielczarek rakontis pri polaj sanatorioj. En junio ni ekskursis al la bela regiono de Ry/Silkeborg. En la ekskurso

partoprenis ankaŭ du gastoj el Hobro. Ni ŝipveturis al Himmelbjerget kaj poste ni vizitis du muzeojn – Ferskvandmuseet kaj Træskomuseet. Lacaj ni ĝuis bongustan torton kun kafo/teo en Rye Gammel Kro.

La 5-an de aŭgusto Dana Radio, programo 3, intervjuis Søren Dalmose. La intervjuo okazis en Skanderborg, kadre de Skanderborg Muzikfestivalo, kaj estis sendata rekte en la programo ”De sprøde Heste”.

En septembro ni rememorigis niajn feriajn travivaĵojn. En oktobro Mathias Dalmose lerte gvidis nin al Brazilo kaj ”Bona Espero”. Estas agrable vidi junajn esperantistojn regi tiel bone Esperanton! Brave, Mathias kaj Jonas!

En novembro ni libere babilis Esperante kaj ankaŭ krokodilis. En decembro okazis la tradicia Zamenhof- kaj Kristnaskovespero.
Koran dankon al vi ĉiuj – gastprelegantoj kaj membroj de Århus Esperantoforening, por la bona kunlaboro en la jaro 2005.

## Nortjutlanda Esperanto Klubo

*Raportas Ejnar Hjorth*

Ni havas kurson por komencantoj lundon vespere kaj por progresintoj merkredon posttagmeze.

Bedaŭrinde ni perdis kontakton kun kelkaj membroj, eble pro tio ke ni ne rememorigis ilin pagi. Do nun mi skribis al ili kaj esperas ke multaj ŝatas denove subteni la bonan ideon Esperanto.

Dufoje ni partoprenis en ekspozicio en Aalborghallen kaj atendas ke tio rezultu en novaj kontaktoj. La lastan fojon 7 Aalborg-anoj respondis la novan kvizon. La premion, kiun ni sendis al ili, konsistis el la libro ”Sprog og sprog imellem” de Preben Bagger, ”Systematikken i esperanto” de Ib Schleicher, la unua kajero de Esperanto laŭ metodo Friis kaj invito pri membreco de nia klubo, por partopreni en senkosta kurso. Kelkaj jam deziras partopreni. Ankaŭ kopion de la statuto de nia klubo ili ricevis. Por ke ili konstatu ke la klubo estas neŭtrala laŭ politiko, religio, naciaj kaj aliaj ideologioj, kaj nur aktivas fervore de Esperanto.

# Kalkulaĵoj

## Noll regnskab 2006

| *Indtægter* | *Kr.* | *Udgifter* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| 4% af DEAs individuaj | 270,00 | Gravsted | 723,13 |
| Renter | 3.408,00 | Tilskud | 6.134,00 |
| | | Kurstab | 3.135,16 |
| I alt | 3.678,00 | | 9.992,29 |
| Årets resultat | 6.314,29 | | |
| I alt | 9.992,29 | I alt | 9.992,29 |

| *Aktiver* | *Kr.* | *Passiver* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Obligationer | 54.482,76 | Egenkapital | 62.926,78 |
| | | Kreditorer | 130,00 |
| Bank | 2.259,73 | Underskud | -6.314,29 |
| I alt | 56.742,49 | I alt | 56.742,49 |

Ileana Schrøder
Formand

Ina Schultz
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden

16/3-2007
Revisor

16/3 2007
Revisor

## DEAs regnskab 2006

| *Indtægter* | *Kr.* | *Udgifter* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Klubber kontingent | 16.705,00 | Administration | 3.031,75 |
| Individuaj | 6.750,00 | | |
| DEJO | 1.480,00 | Gebyrer | 324,00 |
| Gaver | 3.204,00 | | |
| Renter | 5.166,30 | UEA og EEUkontingent | 1.985,80 |
| | | Bogmesse i Forum | 15.630,50 |
| I alt indtægter | 33.307,30 | Arrangementer | 3.686,00 |
| | | Årsmøde udgifter | 439,75 |
| Årets resultat DEA | 6.910,87 | E. en Danio | 9.794,51 |
| Årets resultat Libroservo | 6.004,12 | Repræsentation | 150,00 |
| | | Bestyrelsesmøder | 252,50 |
| | | Kurstab | 4.653,36 |
| | | 4% til Noll | 270,00 |
| | | I alt udgifter DEA | 40.218,17 |
| | | Underskud Libroservo | 6.004,12 |
| | 46.222,29 | | 46.222,29 |

| *Aktiver* | *Kr.* | *Passiver* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Obligationer | 80.860,56 | Egenkapital primo | 173.743,29 |
| Libroservo | 35.605,62 | Årets resultat DEA | -6.910,87 |
| UEA kontoen | 148,44 | Årets overskud Libroservo | -6.004,12 |
| Kassekonto | 0,00 | Egenkapital ultimo | 160.828,30 |
| Amagerbanken alm. | 46.866,22 | Forudbetalinger for 2007 | 4.099,67 |
| Girobank alm. | 1.317,13 | | |
| Debitorer | 130,00 | | |
| | 164.927,97 | | 164.927,97 |

Ileana Schrøder
Formand

Ina Schultz
Kasserer

Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den 16. marts 2007

Lars Kromann Jensen
Revisor

Tara Gregers
Revisor

# Protokolo de la ĝenerala kunveno de DEA 2007

## Okazinta dimanĉe la 21-an de aprilo, je la horo 9.30 en kursejo Brogården, Strib

### 1. Elekto de kunvena gvidanto

Kiel kunvena gvidanto estis elektita Lars Kromann Jensen.

### 2. Elekto de protokolantoj

Kiel protokolanto estis elektita Jonas Dalmose, kunhelpanto Nina Tofte.

### 3. Jara raporto

La prezidanto voĉlegis la raporton, kiu estos publikigita en la venonta numero de Esperanto en Danio. Jonas Dalmose aldonis ke li instruis Esperanton en la Martinus-Centro. Peter Weide demandis pri elspezoj kaj rezultoj de la librofoiro, kiuj estis aranĝo de porkomencanta kurso kun partopreno de 10 personoj. Betty C. rimarkis la avantaĝojn de translokiĝo al la Kulturdomo en Kopenhago, kaj Ileana informis ke tiu ĉi jaro estas la lasta koncerne la solidiĝon de la Fondusa Esperanto-Domo kapitalo kaj instigis la membrojn donaci 50 kronojn. Holger Jensen ŝatus havi skribitan jarraporton. Peter Weide rimarkis ke ĝi estus devinta aperi en la hejmpaĝo laŭ la statuto.

Sekvis diskuto pri reklamado de Esperanto. Kim Henriksen menciis la Karnavalon. La prezidanto opiniis ke la disdonado de flugfolioj ne taŭgas, se oni ne informas samtempe buŝe pri la lingvo kaj movado. Ni spertis ke plej taŭga maniero ĝis nun estis partopreno en la librofoiro, kie ni montras la riĉecon de la Esperanta literaturo, sed ĝi estas multekosta kaj DEA ne partoprenos ĉi-jare, sed partoprenos en pluraj aliaj foiroj kiuj estas malpli kostaj. Sekvis disputo pri la posedo de la retadreso kiun Kim uzis. Ĝi ne estas privata sed apartenas al la hejmpaĝo de DEA.

La kunvenon partoprenis Radojica Petrović kiel gasto kaj li laŭdis la laboron de DEA kaj de la ILEI-sekcio por eduki instruistojn. Estis por li ankaŭ precipe ĝojige vidi junulojn partopreni la kunvenon kaj gratulis pri ilia laboro.

La jarraporto estis unuanime akceptita.

### 4. Jara kalkulaĵo

La kasistino Ina Schultz prezentis la kalkulaĵon. Ŝi emfazis ke la rezulto estas kontentiga ĉar DEA havis multajn aktivecojn dum la pasinta jaro. Pri la pasiva saldo de Libroservo Arne Casper respondis kaj klarigis: i.a. ke la vendado de libroj dum la lasta jarkunveno en Malmö estis duonigita pro la ĉeesto ankaŭ de la sveda Libroservo. Holger Jensen demandis pri la mono kiun Vejle sendis al DEA kiam la klubo malfondis sin, kaj la kasistino respondis ke la enspezoj eniros la kalkulaĵon de 2007.
La kalkulaĵo estis aprobita.

### 5. Propono de Næstved Esperanto-Unuiĝo

Henning Olsen klarigis la proponon kaj li opiniis ke la kluboj devus havi reprezentanton por havi pli da influo. La prezidantino respondis ke la plejmulto de la kluboj jam havas reprezentantojn. Eliza Kehlet proponis ŝanĝi la vorton „reprezentanto“ per „observanto“. Betty Chatterjee kaj Ejnar Hjort argumentis kontraŭ la propono. Same faris la prezidantino dirante ke dum estrarkunsidoj ne taŭgas havi multajn diskutantojn, ĉar tio faras la kunsidon malefika. Oni laŭ deziro decidis fari skriban voĉdonon, kaj la rezulto estis: 9 por la propono, 27 kontraŭ, 4 sindetenoj.

### 6. Elekto de prezidanto

La prezidantino Ileana Schrøder estis reelektita.

### 7. Elekto de 4 estraranoj

Jens S.Larsen, Rasmus Høyrup Jensen kaj Ina Schultz estis reelektitaj por 2 jaroj. Torben Svendsen estis novelektita por 1 jaro.

### 8. Elekto de 2 anstataŭantoj

Estis reelektitaj la ĝisnunaj Ana Røssum kaj Stanisław Mielczarek el Århus.

### 9. Elekto de 2 revizoroj

Lars Kromann Jensan kaj Tara Gregers estis reelektitaj.

### 10. Jarkunveno 2008

La jarkunveno okazos la 18-20 de aprilo 2008 en la Kulturdomo Dortheavej 61 en Kopenhago, kie ni festos la 100-jaran jubileon de DEA kaj de KEK.

**11. Eventualaĵoj**
E. Rybarczyk proponis skribi al la urbestro pri elekto de stratnomo omaĝe al Zamenhof. La prezidantino dankis al Jytte Sunekær pro plurjara estrarana laboro kaj la ĉeestantaron pro ilia daŭra apogo al la laboro de nia agado.

---

# Peranto de SEL

En la jaro 2007 la Skolta Movado festos sian centjaran jubileon kun partopreno de skoltoj el la tuta terglobo. Ankaŭ Esperantaj skoltoj povos partopreni, ĉar ekzistas Skolta Esperanto-Ligo (SEL) kun sekcioj en multaj landoj, sed bedaŭrinde en Danio la organizo malfunkciiĝis antaŭ kelkaj jaroj.

SEL estis fondita en la jaro 1918 de brita skolto, kiu havis la ideon ke skoltoj tutmondaj povu paroli unu kun la aliaj per Esperanto. Li tiam batalis en la tranĉeoj en Flandrio. Tuj kiam la milito finiĝis, li ekvarbis membrojn al la organizo.

Skoltoj ekzistas en multaj landoj, sed nur en naciaj grupoj, kaj tial SEL fakte estas la plej malnova internacia skolta organizo en la mondo.

Vi povas legi pri SEL en interreto: ttt.esperanto.org/skolta.

Se vi havas intereson pri skoltoj kaj volas helpi al la klopodo por varbi memebrojn de SEL en Danio, bonvolu skribi,

- aŭ al la ĝenerala sekretario Guido Ricci (ulivo.diritto@gmail.com)

- aŭ al mi (bent.bjarke@nielsen.mail.dk).

*Bjarke Nielsen*

# Nekrologo

Svend Dragsted, 27.3.1923 – 30.4.2007. Lia longa kaj enhavoplena vivo nun estas finita.

Dum la periodo 6/6 1954 – 5/2 1962 Svend estis prezidanto de ”Centra Dana Esperantista Ligo” – la tiama DEA – kaj poste li estis redaktoro de ”Dansk Esperanto-Blad” (hodiaŭ ”Esperanto en Danio”). Li ankaŭ estis redaktoro de la kopenhaga revuo Kontaktilo en la periodo 1947 – 1953. Krome li dum periodoj estis estrarano de ”Centra” (CDEL) kaj de K.E.K, dum la periodo 1955 -1957 ankaŭ prezidanto de KEK. Kompreneble li estis Honora Membro de DEA kaj KEK.

Lia esperanto-vivo ankaŭ enhavis aŭtorecon de bonega ”Esperanto-Grammatik” el 1953, kaj ”Miniatura vortareto dana-Esperanto” el 1964, multajn skribaĵojn en gazetoj kaj revuoj, en- kaj eksterlandaj. Krome oni ne forgesu, ke li starigis la korespondajn kursojn en Dansk Esperanto-Institut.

Svend estis homo eksterordinare laborema kaj entuziasma pri Esperanto. Lia laboro havis grandan signifon por nia movado, kaj oni ne povas imagi, kian staton Esperanto havus hodiaŭ en nia lando sen li. Bedaŭrinde lia sanstato dum la lastaj jaroj absolute ne estis kontentiga, sed ĉiam estis grandega plezuro interparoli kun li pri ĉiuj temoj, ĉar li sciis preskaŭ ĉion, kaj havis precizajn opiniojn pri multaj temoj, kiuj koncernas la vivon en- kaj eksterlande, kie li ofte vizitis, ankaŭ dum la lastaj jaroj.

Kara Svend: Restu en paco. Niaj pensoj kaj kondolencoj iras al via edzino Jastrid kaj via familio.

*Lars Kromann Jensen*

# Gazeteltondaĵoj

*Januaro 2007*
Informilo de Post Danmark pri la poŝta stampilo *Esperanto - et mellemfolkeligt sprog*
Martinus-prelego de Ole Therkelsen menciita en Berlingske Tidende kaj 5-loke en Næstved-medioj
*Information:* Konversacio kun Daniel Salomon kaj Olof Olsson pri verdaj helikoj kaj Esperanto

*Februaro*
Prelego pri la mondheredaĵo de Unesko de Lene (kaj Jan) Niemann menciita 3-loke en Næstved-medioj
*Ugebladet Næstved*: Asocia registro
*AOF Odense*: Esperanto-kurso kun Liss-Lotte Talbro
*Sydkysten Weekend*: Betty Chatterjee rakontas pri juna esperantisto, kiu vagadas dum 5 jaroj.

*Marto*
Krucvortenigmo en *Samvirke.*
Prelego pri framasonismo fare de Palle Artmann menciita en Berlingske Tidende kaj 3-loke en Næstved-medioj.
Parto de la libro *Storbyens stammer:* 'Hele verden lige på tungen'.
*Nordjyske*: artikolo pri foiro en Aalborg.
*Information* pri 'La Loko'.

*Aprilo*
Krucvortenigmo en *Hjemmet*
*24 timer*: Vakse Viggo - en europæisk helt, ankaŭ en Esperanto

Kvankam la intereso rigardi la kunportitajn eltondaĵojn fare de la jarkunvenaj partoprenantoj en Strib ŝajne ne estis abunda, estas grave, ke vi daŭre eltondu kaj sendu ĉion pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

## Kopenhago

Kunveno de KEK/DEFA normale okazas ĉiulunde en Kalvebod Brygge 32. Kursoj kaj legogrupo okazas ekde 18.45, programo 19.30-20.15 kaj 20.45-21.30. Dum la paŭzo eblas aĉeti kafon/teon kaj bieron/akvon.

***Okazos:***

Lu 7/5 Ole Stig Andersen, ĵurnalisto, prelegos pri lingvopolitiko.

Lu 14/5: Pro internacia fervojista kunveno ne okazos ĉi-tage kunveno en Kalvebod Brygge. Anstataŭe KEK invitas vin inspekti la kunvenejon de la venonta, jubilea jarkunveno de DEA:

**Kulturhuset Bispebjerg Nordvest**
**Dortheavej 61, 2400 København NV.**

Aŭtobuslinio n-ro 21 veturas preskaŭ ĝis la enirpordo. En la kafejo oni povas je moderaj prezoj aĉeti trinkaĵojn kaj manĝaĵojn.

17.30: Ileana montros al ni la diversajn agrablaĵojn en la Kultura Domo.
18.00: Komuna vespermanĝo en la kafejo por tiuj, kiuj deziras. Prezo por 'plado de la tago' estas 48 kr.
19.00: Mogens Rude distros kaj pensigos nin per la demand: ĉu vi scias, kio estas via V.K.?
20.00: Ni paŭzos kaj poste kantos... ĉu vi havas favoratan kanton? Instruu ĝin al ni dum tiu vespero! Espereble unu aŭ pluraj de niaj ludemaj klubanoj venos por akompani nin.

Pro rezervado de kafejaj tabloj (por vespermanĝo) kaj kompilado de instrumaterialo bv. anonci vin plej malfrue 10/5 ĉe Betty Chatterjee, Vejlegårdsparken 20, st.th., 2665 Vallensbæk Strand, tel. 38 89 10 13, rete chatterjeebetty@hotmail.com.

Lu 21/5 Krucvortenigmoj kaj diversaj taskoj

(Lu 28/5 - pro pentekosto neniu kunveno)

Lu 4/6 Rodica Todor, prezidanto de la rumana fervojista esperanto-asocio, vizitos nin kaj prelegos en la klubo, i.a. (kun aliaj partoprenintoj) pri La ĵus okazinta IFEF-kongreso en Parizo

Lu 11/6 Ni somerstudos - por ne TUTE ferii de la studgrupoj ni ofertas por du grupoj la jenon: (1) Ni skribos leterojn al plumamikoj, ni kantos, ni babilos ... gvidos Betty. (2) Ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj (M. Boulton) ... gvidos Lene.

Lu 18/6 Hokan Lundberg: Deklaro pri internacia lingvo. ĉu la angla lingvo estas 'La Malamiko' aŭ helpilo en la nuna mondo – prezento de *nia* lingvo el alia vidpunkto! Dum kunveno en la Kulturgrupo 9/3 Hokan prezentis sian Deklaron nepublikigitan, kaj ni interkonsentis pludiskuti la aferon dum klubkunveno en KEK/DEFA. Petu ĉe Lene Niemann la materialon, se vi volas legi antaŭ la kunveno ... vi ricevos rete aŭ papere laŭ deziro.

Lu 25/6 Somermeza aranĝo.Henning preparos distraĵojn por ni. Tradicia, agrabla, loz-programa vespero.

Lu 2/7 Ni somerstudos - vidu 11/6. Gvidos Betty kaj Lene.

Lu 9/7 Taskoj kaj enigmoj.

**SA 14/7 – SOMERA EKSKURSO**

La franca nacia tago – Helsingør – dana somero... ĉu vi kaptas la logikon? Rezervu jam nun la tagon, kaj estu preta por surprizoj... Ni renkontiĝos je horo 12.30 ĉe Jan kaj Lene en Hovedvagtsstræde 9E, Helsingør (la trajno de Kopenhaga ĉefstacidomo 11.11 taŭgas), kie ni manĝos la kunportitan lunĉon. Trinkaĵoj haveblas surloke je moderaj prezoj. Poste ni lantos tra la malnova urbo, kie Jan rakontos pri i.a. ligoj al Francio. Ni trinkos kafon (se vi *insistas* kunporti kukon, vi rajtas ... anoncu vin ĉe Jan aŭ Lene, 4926 1319, niemann@kabelmail.dk).

**Bonvenon al somera tago inter samideanoj kaj amikoj!**

Lu 16/7 Rakontu pri vojaĝtravivaĵoj kaj montru kelkajn fotojn.
Lu 23/7 Ni somerstudos - vidu 11/6. Gvidos Betty kaj Lene.
Lu 30/7 Pasporta Servo - klubanoj rakontos pri siaj spertoj vojaĝi kaj havi gastojn.

## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tlf 5572 1240, rete atingebla pere de eho-esperanto@stofanet.dk

***Okazos***

Somera ekskurso sabaton la 9an de junio kun celo *Malerklemmen,* kiu situas en Borup ĉe Roskilde. La ekskurso startos ĉe la stacidomo de Næstved je h 9.45 en privataj aŭtomobiloj. La veturo kostas po 30 kr. Kunportu lunĉon kaj trinkaĵojn. Posttagmezan kafon ni povos aĉeti surloke. Aliĝo al Grete (5572 1240) plej malfrue la 1-an de junio.

La aŭtunajn kunvenojn ni planas komenci vendrede la 14an de septembro.

***Okazis***

02.02: Lene Niemann rakontis pri mondaj heredaĵoj laŭ la Unesko-listo kun precipa atento al la glaci-fjordo de Jakobshavn, Gronlando kaj Angkor, Vjetnamio.

02.03: Palle Artmann prelegis pri framasonismo, humaneca organizaĵo kun mondskala amplekso.

Ceterajn vendredojn – tamen ne ĉiujn – ni uzis por lingva studado.

## Renovigita hejmpaĝo

La 27-an de marto 2007 ekfunkciis la renovigita retejo de ”Fondaĵo Ivo Lapenna”. Ĝi estas tre interesa ne nur el historia vidpunkto, sed ankaŭ el vidpunkto de la hodiaŭa moderna tempo – kaj same aktuala ankaŭ por estontaj generacioj!

En la retejo estas troveblaj abundaj informoj ne nur pri la vivo, personeco kaj agado de Lapenna mem, sed ankaŭ pri la fondaĵo kaj stipendio ”Lapenna”, la Instituto Ivo Lapenna, kaj estas aŭkulteblaj kaj elŝuteblaj pluraj liaj paroladoj en formato mp3.

Adreso de la retejo: http://www.ivolapenna.org
Retpoŝta adreso: <lapenna@mobilixnet.dk>

Bonvenon en la retejo, prizorgita de Steen Vester!

*[Eventoj]*

## Ekvilibro post trijara laboro

La Estraro de UEA, elektita en la Pekina UK en 2004, kunsidis en Roterdamo de la 13-a ĝis la 15-a de aprilo. Temis pri la lasta ordinara kunsido de la nuna Estraro. Same kiel en ĉiu kunsido dum la pasintaj tri jaroj, ankaŭ en la lasta partoprenis ĉiuj estraranoj. ĉeestis krome la ĝenerala Direktoro, Konstanta Kongresa Sekretario, redaktoro de "Esperanto" kaj observantoj de TEJO (Chuck Smith) kaj ILEI (Zsofia Korody).

Pro personaraj problemoj en la Centra Oficejo la financaj raportoj ankoraŭ ne pretis. ĉar la plej gravaj eroj de la spezokonto tamen estis finkalkulitaj, estas jam klare, ke en 2006 la en- kaj elspezoj ekvilibriĝis. La buĝeto de 2006 antaŭvidis negativan saldon de 8650 eŭroj, sed la fina minuso estas nur kelkcent eŭroj. Por la jaro 2008 oni proponas plene ekvilibran buĝeton. La Estraro enoficiĝis fronte al deficito de 57194 eŭroj en 2003 kaj povas do kalkuli la financan resanigon de la Asocio inter siajn ĉefajn atingojn.

Oni konfirmis la konsiston de la Loka Kongresa Komitato de la 93-a UK en Roterdamo (19-26 julio 2008) kun Ans Bakker-ten Hagen kiel prezidanto. La estraranoj diskutis ankaŭ pri la temo de tiu UK, sed ĝi ankoraŭ atendas finan vortumon. ĉar en 2008 oni festos la 100-jariĝon de UEA kaj ĉar ĝi estos Internacia Jaro de la Planedo Tero, oni klopodas kunigi ambaŭ aferojn sub sama temo. Por trovi taŭgan kaj elegantan vortumon la Estraro atendas proponojn ankaŭ de komitatanoj kaj aliaj interesitoj.

La elektado de la loko por la UK en 2009 proksimiĝas al la fina decido. La Estraro definitivigis, ke ĝi okazos en Pollando por festi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof. La fina elekto okazos en Jokohamo inter Bjalistoko kaj Poznano.

La Estraro benis formale la jam pli fruan intencon transdoni la premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj por publikigo en la nova revuo "Beletra Almanako", kiun la eldonejo Mondial lanĉos ĉi-jare. Al la eldonserio Oriento-Okcidento estis akceptita nova titolo, "Maitreyi" de la granda rumana verkisto Mircea Eliade, aperonta ĉe la eldonejo Bero. La 23-a okazigo de la fama Esperanto-aranĝo ARKONES en Poznano (21-23 septembro 2007) ricevis aŭspixiojn de UEA.

*[el gaz.kom. de UEA 260]*

## Simbola konkurso

En 2008 ankaŭ Universala Esperanto-Asocio estos 100-jara. Tiuokaze la estraro de UEA aljuĝi premion por la ple bona jubilea simbolo.

La serĉata simbolo emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la daŭran aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj. Ĝi estu elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike. Ĝi estu unukolora aŭ plurkolora sed ankaŭ unukolore uzebla. La simbolo ne anstataŭos la ĝisnunajn (la verda stelon, la simbolon de 1987 k.a.).

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu, eĉ neesperantisto, kaj per pli ol unu konkursaĵo. La gajninto ricevos premion de 500 eŭroj. La rajtoj pri la premiita konkursaĵo, inkluzive de ĝia eventuala adapto, apartenos al UEA.

Oni povas proponi simbolon ĝis la 30-a de junio 2007 al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ rekte al simbolo@co.uea.org.

## Mallonge

- La universitato de Shenĝang, Ĉinio, verŝajne faris historian rekordon: La 1-an de marto 2007, 600 studentoj eniris kvar Esperanto-kursojn. Ili akiros 2 studpoentojn, se ili sukcese pasos ekzamenon.
- La 43/aj Baltaj Esperanto-Tagoj (BET) okazos 14-22 de julio 2007 en Šiauliai, urbo en norda Litovio. Ĝi enhavos riĉan kulturan programon, Someran Universitaton, diversgradajn Esperanto-kursojn, ekskursojn kaj ĉiutagan gazeton; entute ĝi ŝajnas esti taŭga anstataŭaĵo (aŭ aldonaĵo) de la ĉi-jara UK, se oni opinias ke Jokohamo situas tro longe for. Oni aliĝas ĉe Litova Esperanto-Asocio (retejo www.esperanto.lt).



***Fotoj el la foiro ”Korpo Menso Spirito” en Aalborg, marto 2007.***
***Supre: deĵoras Kamma, Finn kaj Arne.***
***Malsupre: interesitaj vizitantoj.***





*El la jarkunveno en Strib.*
*Supre: la kongresanaro fotita de la asocia prezidantino.*
*Malsupre la sabataj prelegantoj: David-Emil Wickström, Dennis Priskorn kaj Radojica Petrović, fotitaj de Peter Weide.*





